

Ankom 13/4 - 99

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1999:1

Nun pli ol 1 000 000

The screenshot shows a web browser window titled "ESPERANTO" with the address "http://www.esperanto.se/". The page features the "esp@ranto" logo and a "VIRTUALA ESPERANTUJO" badge. The main content is organized into three columns:

- V·Ä·L·K·O·M·M·E·N**: A welcome message in Esperanto, mentioning the Esperanto Federation and the website's popularity. It includes a "Snabbval:" dropdown menu and a "Membras en Rondo Zamenhof." section with links for "Aliajtt-ejo", "Listigu", "Aldonu", and "Redaktu".
- 17 mar 1999 6:50**: A central navigation menu with arrows pointing to various sections: "SENASTE NYTT", "AKTUALE", "AKTUELI", "MOVADO", "KOM ESPERANTO", "ORGANIZO", "ORGANISATION", "STUDOJ", "STUDIER", "KULTURO", "KULTUR", "UTILAJ LIGILOJ", and "NYTTIGT".
- B·O·N·V·E·N·O·N**: A message welcoming visitors to the Esperanto-Federacio website, highlighting its popularity and the "Kiosko" section. It includes a "Rapida elekto:" dropdown menu and a "Honorigita per la PREMIO 'LUMO'" badge.

The browser's status bar at the bottom shows "Zonen Internet".

Vespere la 16-an de marto estis registrita vizito 1 000 000 al la informejo de SEF. La kvanto da vizitantoj konstante kreskas kaj atingas nun 90 000 ĉiun monaton.

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Januaro 1999 • 87-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus
Franko Luin (teknisk redaktör)

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck AB, Stockholm

Prenumeration 1999: 180 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se
www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1999:

Direktansluten medlem 180 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 270 kr (inkl. 1 ex. av *La Espero*. Tilläggsex. kostar 90 kr).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Hemsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp den 31/3**Manus till La Espero**

sänds till Jan Setréus
Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden
(tel./fax 08 - 717 75 67)

Boo Mee

Estis antaŭ longe, komence de 60-aj jaroj. Mia sola amikino preskaŭ duonmortis kuŝante en malsanulejo. Ĉiam, ĉie ni estis kune; en kinejo, en restoracio, en ekspoziciejo, en la palacoj, en parkoj, en bazaroj, en la naturo kaj ĉie. Akcidento kuŝigis ŝin, kaj de tiam mi fariĝis tute sola, kaj mi ne povis iri ien ajn sole. Mi atendis vane ŝian re-saniĝon dum du jaroj, nur kurante al ŝi post mia laboro. Ĉiuj skuis kapon al mi. Mi sentis mian handikapigon dum la tempo. Mi devis memstari. En iu tago mi veturis sola al ekspoziciejo Jung-Ang Gong-Bo-Kwan. Tie okazis Esperanto-ekspozicio kaj la momento de mia sorto venis. "Mi povas legi mondan literaturon per Esperanto. Esperanto povas anstataŭi mian amikininon!" Ŝi lasis min post unu jaro por ĉiam.

"Semanto" Kim instruis nin en YMCA, du horojn ĉiu-vespere de lundo ĝis sabato. En Koreio sabato estas labortago ankoraŭ. Unu-monata kurso rapidis. Poste ni organizis rondon, STELARO, por daŭrigi nian progreson de Esperanto Nia Stelaro aktivis meze de Seulo. Kaj subite mi edziniĝis kun esperantisto. Unuan kaj duan jarojn ni uzis nur Esperanton, eĉ nia unujara filino montris eksterlandecan akcenton. Post unu jaro tiu amuza fenomeno akordiĝis al gepatra lingvo. Tuj venis familia krizo. Mi klopodis forgesi Esperanton. Mi lasis la lingvon escepte de du leteramikoj en Svedio kaj Germanio.

Kiam mi loĝis en Kanado okazis 69-a UK en Vankuvero. Mi intencis renkonti mian germanan amikon, ĉar li estis maljuna kiel mia patro, kaj tiam mi eksciis ke la sveda amiko mortis en malsanulejo. Pro tio mi sentis emon renkonti lin antaŭ ol li forpasis. Li ĝis nun tre bone vivas vojaĝante en Esperantio. Tio estis mia unua UK. Post pli ol dekkvin-jara foresto mi denove renkontis nian komunumon. Mi vidis kiel bone funkciis komunikado eĉ post longa paŭzo. Tie kaptis mia sorto min denove. Mi ne volis kredi, fidi kaj akcepti la sorton, sed finfine mi kaptiĝis aŭ tiriĝis je mia sorto.

Jam proksimiĝas dekkvar-jariĝo en Svedio. Kion mi faris dum tiu tempo? Mi strebis enradikigi mian vivon en



lando de mia edzo, kun multaj gajaj kaj malgajaj okazaĵoj. Dum lastaj kvin jaroj mi instruis Esperanton al infanoj en miaj lernejoj. La infanoj diligente skribis leterojn kaj malpacience atendis respondojn. Tiu luksa kaj ĉarma vorto "internacia korespondado" loĝis multajn infanojn. Intima kaj amuza leterkontakto donis fortan impreson al ili. Ili vere ĝuis internacian amikecon kaj ili spertis eblecon kontakti kun alilandanoj per Esperanto.

Tamen tia laboro postulas multe da tempo, energio, strategio, pacienco kaj stirforto. Multfoje instruistoj kaj gvidantoj perdis paciencon kaj forton daŭrigi la laboron. Ĉar infanoj estas infanecaj kaj ili ne scias kio estas respondeco en sia agado.

Unu ironia afero estas ke la infanoj vekas kaj donas la laborofoton de la instruistoj. Labori kaj kaj por infanoj estas same kiel labori kun malordigitaj fadeno, kiu rabas tutan liberan tempon, kaj iom poste la ordo bedaŭrinde denove intermiksiĝas. Ordigi malordigitan fadenon estas pli facile ol labori por intermiksita rilato de homoj, ĉar la laboro kuniĝas al nia sento, kompreno kaj miskompreno, eĉ ĵaluzo. La rilato kaj influo ne restas nur inter la infanoj, sed ankaŭ ekster nia grupo. Tio montras ke la laboro estas tre grava kaj malfacila. Tamen mi esperas ke viglaj, saĝaj kaj fortaj esperantistoj prenu kaj daŭrigu la taskon. Tiam nia estonteco bele floros.

I Lesjöfors igen

I enlighet med ett principbeslut att förlägga varannan kongress till Esperantogården i Lesjöfors bjuder Esperantoförbundet sina medlemmar till Lesjöfors under pingstagarna i år, 22 - 24 maj.

Förutom Esperantoförbundet kommer ungdomsförbundet SEJU, Esperantoförbundet, svenska ILEI och KELI att hålla möten.

I Stellan Engholms namn

Eftersom det är 100 år sedan **Stellan Engholms** födelse kommer årets kongress att uppmärksamma denna esperantoförfattare och översättare, med ett eget huvudord i Nationalencyklopedin just som esperantoförfattare. Vi känner alla till hans böcker om byn Torento och de underbara översättningarna av Selma Lagerlöfs böcker. Att hans själv bodde i trakterna ska inte heller glömmas.

Hollywoodfilm

Man planerar dessutom något så ovanligt som en filmkväll där en Hollywoodfilm inspelad 1965 helt på esperanto kommer att visas. Det är ännu inte helt säkert att man lyckas få filmen till Sverige, men vi håller väl tummarna! Den manliga huvudrollen i filmen spelas av en ung **William Shatner**, känd för den som brukar titta på tv som "kapten Kirk" i Star Trek. Det du! Hur hans och hans medspelares uttal av esperanto är får till dess förbli en hemlighet och en överraskning.

Om filmen har vi hittat olika omdömmen. En fransk filmkritiker tyckte att den är "le plus grand film fantastique depuis 'Nosferatu'", dvs. den bästa fantasifilmen efter "Nosferatu", som i filmstudiokretsar betraktas som en riktig klassiker från stumfilmstiden. En amerikansk kritiker tyckte att det var ett misslyckat amerikanskt försök att göra en konstnärlig film i stil med Ingmar Bergmans "Jungfrukällan" och "Det sjunde inseglet". Vi får se vem som hade rätt. Kanske båda?

Hur som helst, ett liknande tillfälle lär inte återkomma så snart igen.

Vänlig mot plånboken

Detta blir en verkligen budgetvänlig kongress. Kostnaden för deltagande består av två bitar: deltagaravgift och logi + mat.

Deltagaravgiften är **250 kr** vid inbetalning **senast den 20 april** och **350 kr** vid inbetalning efter denna dag. SEJU-medlemmar betalar **100 kr**.

Logi och mat fr.o.m lunch den 22 maj och t.o.m frukost den 24 maj är **700 kr**. Då ingår mat, inklusive måltidsdryck, och övernattning i två nätter i flerbäddsrum (inklusive lakan).

Vill man ha enkelrum tillkommer 250 kr. Om två personer vill dela dubbelrum tillkommer 125 kr per person. Den som väljer enkel- eller dubbelrum kommer att få logi på ett närliggande hotell eller i privatrum.

Vid program som sker i Folkets hus kommer kaffe med dopp att serveras vid tre tillfällen. Vid kongressanmälan ska man ange om man vill ha denna servering, som då tillsammans kostar 75 kr.

Utflykt i Nordmark

Annan dag pingst ägnas helt åt utflykt till besök i Nordmark med besök i gruvmuséet och gamla gruvan. Avgift: 25 kr.

Före avfärden till Nordmark ska man kunna köpa smörgåspaket på Esperanto-gården för 40 kr. Kaffe ingår, men då måste man själv hålla sig

med termos.

Den som vill åka till Nordmark men saknar eget fordon kommer troligen att kunna få åka med i den buss som Stockholmsklubben planerar för resan till och från Lesjöfors.

Sammanfattning

Anmälan senast 20 april

Anmälningsavgift	250 kr
Mat och logi	700 kr
Extra kaffe med dopp FH	75 kr
Utflykt till Nordmark	25 kr
("Rubbet" för 1050 kr.)	

Anmälningsavgiften för SEJU-medlemmar under 20 år är 100 kr.

Tillägg

Anmälan efter 20 april	+100 kr
Enkelrum	+250 kr
Dubbelrum per person	+125 kr

Anmälan genom inbetalning till **postgiro 481 43 95-2**, Esperantokongressen. Ange på talongen vilka inbetalningen avser och vad som beställs.

Rapport från Helsingborg

Av 29 elever från de tre gymnasieskolorna Nicolai, Tycho Brahe och Olympia var det ett 25-tal som verkligen började. Ryktet spred sig snabbt och det dök upp elever från när och fjärran och bad att få sitta med och auskultera en lektion eller två. Kanske blivande esperantister.

Under terminens gång tillkom tre elever och fem försvann. Eller började inte. Troligen sådana som kom dit på sitt tredjeval. På tisdag den 15/12 slutar den första klassen och kommer att få sina esperantostjärnor. Elever saknar traditioner och symboler och därför är det viktigt med detta "stjärnfall". Det betyder mycket för dem. Det blir ett 20-tal som går ut och får betyg, 18 tjejer och två killar. Nästa termin startar en klass på den privata friskolan Johannes Hedberg och de kommer också att läsa en 60-poängskurs men då på två terminer i stället för en. Och endast två lektioner i veckan.

Den starkt bidragande orsaken till framgångarna är en ny företeelse

som heter elevdemokrati och innebär att eleverna sitter i majoritet i skolans styrelse. Genom att Henrik och en flicka som också tillhör Aktiva Esperanto-klubo suttit med i skolans styrelse har de haft direkt inflytande på beslutet om att införa esperanto på schemat som fritt tillvalsämne.

Det bör noteras att enligt Lärarnas Tidning är det endast 14 skolor i landet som tillämpar just elevdemokrati. Det kan tyckas som en exemplös framgång med esperanto på gymnasieskolan men vi har lång väg kvar. Vi arbetar nu med att etablera kursen och få den förlängd till ev. fyra terminer och ge den c-språksstatus i stället för som nu fritt tillvalsämne.

Vi arbetar också med att sprida den till andra skolor och redan nu har idéerna spritt sig till grannkommunerna. Bl.a. har en språklärare i Klippan ringt och vill ha råd och stöd för att kunna börja på det gymnasium han tjänstgör på.

Kjell Randedeh
(El La Folio dec. 1998)

OBS!

Från Stockholm planerar man att åka med hyrd buss på morgonen den 22 maj, hemåt annandag pingst.

Pris för resan tur och retur: 400 kr.

Anmälan till Esperanto-Centro, tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10.

SEJU-renkontiĝo

SEJU aranĝis tuttagan (preskaŭ) renkontiĝon por esperantistoj en Helsingborg. Estis la semajnfino kiun la cetera mondo verŝajne memoros pro la granda neĝado en Gävle, sed kelkaj memoros ĝin pro aliaj kaŭzoj.

Al la renkontiĝo venis proksimume 25 homoj, inkluzive de la SEJU-estraro, kelkaj eksterlandanoj (du danoj, unu germano) kaj lokaj aranĝantoj. Entute estis kvar aktivajoj dum la tago, kaj ĉiuj iris tre glate; grandaj laŭdoj precipe al Kjell Randedhed pro tio.

Kroma jarkunveno de SEJU

Pro la forlaso de nia antaŭa SEJU-prezidanto Anna-Lena, kiu nuntempe iĝis kasisto de TEJO, estis necese havi kroman jarkunvenon por elekti novan prezidanton. La tuta jarkunveno pasis en kvin minutoj, kompreneble estis en esperanto, kaj la nova prezidanto de SEJU estas Håkan Lundberg, antaŭe vicprezidanto.

Håkan ankaŭ faris mallongan paroladon al la jarkunveno:

– Dankon.

Promenado

Kiam la jarkunveno estis preta okazis mallongaj diskutoj pri kion fari, kun la sekvo ke ĉiuj iris promeni en la bela urbo de Helsingborg. La danoj, kun helpo de kelkaj Helsingborganoj, ankaŭ komencis ĵeti neĝon je la resto de la grupo. (Kelkaj de tiu resta grupo kompreneble ĝuis reĵeti tiun neĝon, kaj aldoni iom pli.)

Fine de la promeno oni kaptiĝis en renkontiĝo de la "kvin-antaŭ-tagmezo"-movado. (Ili kompreneble havis sian renkontiĝon je la 11h55.) Post ioma aŭskultado, la grupo fine iris manĝi bonan, vegetaran lunĉon.

Informkunveno

Post preskaŭ malfrua alveno al la Olympia-lernejo por kelkaj, dum aliaj estis intervjuataj de *Helsingborgs Dagblad*, komenciĝis do la celo de la tago: Kunveno en kiu SEJU rakontas al siaj membroj pri la eblecoj de Esperanto. Estis informado pri inter alie SEJU, TEJO, Karlskoga kaj la Esperantodomo en Lesjöfors.

Ĉiuj kiuj partoprenis la kunvenon – kaj la informantoj kaj la aŭskultantoj – opiniis ke estis sukcesa aranĝo, kaj ni certe refaros.

Vesperaj aktivajoj

Kiu esperanta aranĝo estas kompleta sen vesperaj ĝuoj kaj diskoteko? Ne-niu, ni pensis. Ni ne eraris, sed iom erare taksis: La diskoteko ne fariĝis la sama sukceso kiel en KEF, sed ja estis

aktivajoj. (Nun vi certe scivolos: Ĉu vere estis diskoteko en KEF? Jes. Mi scias, ĉar mi kaj Kimo ludis la muzikon tie. Kvankam ne kune.)

Malgraŭ la tro frua fino de diskotekumado okazis agrablaj aferoj ankaŭ dum la vespero. Inter alie, unu el la SEJU-estraranoj (mi) trovis tre revizitindan knabinon tie...

Janko Luin

SEJU-estrarano

(kiu, je la presado, verŝajne jam revizitis sian Jessica)

Svala eller drake

Till den nya esperantotidningen La Hirundo (jan. 1999) utgiven i Upplands Väsby har Kjell Randedhed i Helsingborg lämnat ett debattinlägg. Han tar upp behovet av en gemensam tidning i stället för ett flertal små medlemsblad. Han skriver:

"...i stället för sju halvhalvbra tidningar kunde vi gemensamt satsa på EN RIKTIG med Helsingborg som centrum, därför att här finns redan ett grafiskt sådant med högteknologiska maskinparker och en grafisk skola, vilket gör att vi skulle kunna producera en ur teknisk synvinkel mycket tilltalande produkt i fyrfärg och till ett vettigt pris.

Det gäller att hänga med i svängarna och det är vad esperantorörelsen inte lyckats med. Vi måste få ut vårt budskap och skapa en flerspråkig nordisk tidning med fem olika editioner och distribuering bl.a. genom pressbyråerna. Vi borde då lätt kunna komma upp i en upplaga om minst 2.000 ex., vilket är gränsen för presstöd...

Finansieringen då, kanske någon undrar? EU-pengar så klart, i kombination med privata investerare med satsning på annonsering precis som alla andra tidningar. Som det nu är finns det inte en enda Esperanto-tidning som drivs professionellt utan endast på idealistiska grunder och med känt resultat, dvs blygsamma upplagor producerade av idealister för andra idealister..."

I sitt svar skriver redaktionen bl.a.:

"...Det är inte så, att *La Hirundo* är ett liknande projekt som de klubb-tidningar Randedhed nämner. Dessa är nämligen just klubb-tidningar, vilket *La Hirundo* inte avser att vara... Men om projektet i Helsingborg kommer till stånd, skall vi i positiv anda gå in i diskussioner om samarbete eller sammanslagning. Till dess är vår

avsikt att göra en tidning för alla esperantister (i första hand i Sverige, i andra hand i hela Norden) oavsett om de är organiserade eller inte."

Det finns uppenbarligen utvecklingsstankar i denna diskussion som går i en annan riktning än den motion som

Malmöklubben lade fram till kongressen 1997 angående La Espero. Om alla lokala medlemsblad inklusive La Espero m.fl. tidningar med nationell täckning skulle föras till en gemensam nordisk tidning, skulle även information av lokal karaktär från Skövde skickas upp till Tromsø osv. Spridningen av information om kommande seminarier, kongresser, kulturmöten etc. i Norden skulle troligen bli bättre. Randedhed förespråkar flerspråkighet, men idén stimulerar kanske just till att profitera på att vi har eliminerat språkproblemet. Å andra sidan kanske vi med tiden närmar oss den vision som låg till grund för Malmöklubbens tankar, där praktiskt taget alla esperantister har tillgång till Internet för nyhetsinformation, även om det kan dröja ännu en generation (huruvida människo- eller data-generation överlätes åt läsaren att komma underfund med). Hursomhelst lär debatten fortsätta, och gärna i La Espero!

Red

Somera kurso en Esperanto-Gården

Ĝi okazos 14-23 junio 1999 (kollektiĝo la 13 junio vespere).

Estos laŭ samaj kondiĉoj kiel en 1998. Do kvin diversaj kursoj – unu por komencantoj, 3 niveloj por progresantoj, unu estas konversacia, krome kurso por infanoj. Eksterlandaj kaj svedaj instruistoj. Vespere estos kanto kaj muziko. Programo kaj prezo venos baldaŭ. Pli da informoj de:

Lars Forsman, Karlskoga Folkhögskola, tel. 0586-64614
Lennart Svensson, Esperanto-Gården, 0590-30909
Märtha Andréasson, 031-571133

DONACOJ

Alf Erichsen,
Mölnlycke,
150 kr
Ido-stiftelsen för
främjande av
världsspråksidén,
15 000 kr
Nils-Erik Kristoferson,
Stockholm,
400 kr

MEMORE AL KARL SÖDERBERG

Anna-Greta kaj Jan Strönne, Malmö,
100 kr
Gulli Svensson,
Malmö, 100 kr

MEMORE AL EUGEN RYTENBERG

Jan Setréus, 150 kr

KLUBO CENT

Åke Palm, Malmö,
100 kr
Alice och Nils
Johansson,
Norrköping, 200 kr

NI GRATULAS OLLE OLSSON, LUND PRO LA 90 JAROJ

Lisbet kaj Bertil
Andreasson
Karin kaj Bernt
Lindquist
Gertrud kaj Torsten
Lund
Anna-Greta kaj Jan
Strönne
Beatrix kaj Sten
Svenonius
Gulli Svensson
550 kr

Ĉu korekte?

Sub la rubriko "Lingvo" (*La Espero* 5-6/1998, p.2) Roland Lindblom citas mian Etimologian Vortaron en iom misgvida maniero. Temas pri la adjektivo "korekta", kiun Roland (laŭ PIV) rekonas nur kun la senco "rilata al korektado", dum mi opinias ĝin uzebla en la signifo "ĝusta". Estas vere ke la Etimologia Vortaro mencias la PIVan kondamnon de tiu uzo (ripetitanta en Aktoj de la Akademio II, 54), sed la kompleta teksto donas tute alian impreson: mi diras, ke la radiko "internacie manifestiĝas precipe en la adjektivo (pro tio la ofta uzo de Eo korekt/a en la senco 'ĝusta, laŭregula') kaj mi citas Beaufront 1902, Wüster 1929, Plena Vortaro 1934, Waringhien 1957, al kio oni povas aldoni Zamenhof mem: "via desegno ne estas sufiĉe korekta", "paroli en lingvo korekte" (ekzemploj el Nomura, Zamenhofa ekzemplaro). Do, se mi estas 'neobeema' al PIV, mi estas en plej bona socio! Gramatike, korekt- estu rigardenda kiel radiko dukategoria kiel estas ekz. fals- (adj. kaj verba: Aktoj, p. 45), fiks- (adj. kaj verba: Aktoj, p. 43).

Cetere, ĉar la menciita artikolo estas la unua publika elpaŝo rilate la grupon kiu preparas novan esperanto-svedan vortaron: ĉu estas eble sciigi kiuj personoj konsistigas la grupon kaj kun kia tempa perspektivo ĝi laboras? Mi deziras bonan laboron!

Ebbe Vilborg

Tasko de vortaristo

Kiel oni ĉefe uzas esperantan-svedan vortaron? Evidente svedoj uzas ĝin por ekscii la signifon de iu nekonata esperanta vorto, kiam ili aŭdas aŭ legas tion.

La unua tasko de tia vortaro do estas registri kiom eble plej multajn el la praktike uzataj vortoj, kaj komprenigi al svedlingvano, kiun signifon ili havas por la uzanto.

Se la vortaristo ŝatas aŭ ne ŝatas iun vorton, aŭ iun apartan signifon de vorto, do ne gravas. Kion oni povas renkonti en esperanta babilado, leteroj de plumamiko, poemaro aŭ solena parolado, tion oni devas trovi ankaŭ en la vortaro. Kaj oni devas ekscii, kion la plumamiko aŭ poeto volis diri per la vorto.

La vortaristo ja povas ornamati la

kapvortojn per diversaj simboloj kaj mallongigoj kiel "evit." kaj simile, sed ĉio tia estas akcesorajxo. Des pli ĉar du esperantistoj neniam konsentas, kio vere evitindas.

Tial iomete maltrankviligis min la ĉefartikolo de Roland Lindblom en *La Espero* 1998:5-6, kie li anoncas laborgrupon por verki novan Esperanto-svedan vortaron, kaj krome disvastigas siajn personajn preferojn pri kelkaj vortoj. Kelkaj el tiuj preferoj estas bone konataj, kvankam same ofte kontestataj, kiel la ideo, ke ne eblas diri "korekte" en la senco "senerare". (Bertilo Wennergren en PMEG traktas la temon saĝe kaj sobre, vidu Interrete ĉe <http://cgi.algonet.se/~bertilow/cgi-bin/m.cgi?d=pmeg/pmeg8/vfqfinaf.htm#korekta>). Aliaj el la preferoj de Roland L estas sufiĉe bizaraj, kiel lia propono de "plejbo" (anstataŭ "plejboj")? Li ankaŭ preferas "ekoo" antaŭ "eĥo", "ĉar ĝi similas al la fenomeno"! Ĉu la sono de eĥo ne dependas de tio, kion oni vokas?

Ni ĉiuj havas niajn personajn preferojn kaj idiosinkraziojn. Sed estus terure, se ni permesus al tiuj influj la elekton de esperantaj vortoj en esperanta-sveda vortaro. Tio estus ne malpli ol perfido kontraŭ la uzantoj!

Krome, rekomendoj kutime post iom da tempo malaktualiĝas. Memoru la rekomendojn antaŭ kelkaj jaroj de vortaristoj kaj terminaristoj, ke ni uzu "komputero" aŭ "-oro", ĉar "komputilo" estas tiu aparato kiu mezuras la gaskonsumon. Eĉ Vilborg en sia bona sveda-esperanta vortaro mencias unue "-oro". Post nur ses jaroj tiu prefero ŝajnas arkaika kaj ridinda. Hodiaŭ "komputilo" jam tute superregas en la praktike uzata lingvo.

Roland L skribas, ke la laborgrupo devas "strikte pririgardi ĉiun vorton antaŭ enmeto en la vortaron". Jes, bonege, sed laŭ kiu kriterio? Poste li diskutas kiujn ŝanĝojn kaj novajn vortojn proponi. Mi ne volas ofendi, sed tiuj vortoj al mi sonas tre proksime al enorma miskompreno pri la tasko de vortaristo!

Kial ne prezenti en *La Espero* la konsiston de la laborgrupo, kaj lasi ĝiajn anojn prezenti sin kaj sian aliron al la grava tasko?

Al mi ŝajnas klare, ke PIV estas la ĉefa komune normiga verko, kiam temas pri la stoko de radikoj pli-malpli akceptataj en esperanto. Kaj mi konsentas, ke la ekzemploj de PIV estas eble ĝia plej grava valoro. Sed necesas krome konscii, ke la DIFINOJ en PIV ofte estas tro limigitaj, kaj ne plene spegulas la praktikan lingvuzon. Facilas trovi ekzemplojn. "Jako" – laŭ PIV – estas nur vira vesto. Kion do portas virinoj? "Mastrumistino" – laŭ PIV – estas pagata laŭhoro. Do kiel

nomi tiun, kiu ricevas monatan salajron?

Roland L skribas: "Se vi iras ekster la normoj la lingvo perdos sian klarecon". Sed kio do decidus la normon? Kompreneble la kolektivo de ĉiuj uzantoj! Vortaristo povas iomete influigi, kondiĉe ke li komprenas sian rolon, sed ĉefe li devas nur priskribi la reale ekzistantan lingvon!

Sten Johansson

Ĉu mal-korekte?

En la programdeklaro, kial li meze de la dua mondmilito decidis ekeldoni *Malgrandan revuon*, Stellan Engholm (1899–1960), verkisto (i.a. Torentolibroj), tradukisto (i.a. Gösta Berling de Selma Lagerlöf), redaktoro kaj eldonisto skribis jene:

"La lingvo en la revuo estu korekta, tiel ke ĉiu leganto povos akcepti ĝin kiel bonan kaj imitindan esperanton rilate al korekteco. Ankaŭ la stilo de la artikoloj estu kiel eble plej bona kaj moderala."

Ĉu eblas pli klare esprimi la uzon de "korekta"?

Franco Luin


Esperanto-examen

Svenska Esperantoinstitutets skrivningar för högre och lägre examen äger rum söndagen den 25 april 1999. Information ges av:

Ebbe Vilborg
Prästgårdsängen 2
412 71 Göteborg
Telefon 031 - 40 52 74

Du interesaj homoj, kiuj havis saman celon kaj multon komune

Nomo: L.L. Zamenhof
Sur la tero: 1859 - 1917
Loĝlando: Rusa Imperio, nuntempa Pollando
Mallonga vivhistorio: elkreskis en multlingva medio; estis farinta lingvon (kiu estis ne tute simila al la nuna esperanto) kiel 19-jarulo; kuracistiĝis; geedziĝis kun Klara Zilbernik; prezentis esperanton (1887); verkis la homaranismon; planis kongreson pri neŭtrale-homa religio, sed mortis antaŭ ties realiĝo.



Mi ŝatus prezenti du, laŭ mi, interesajn homojn kaj iom pri iliaj eĉ pli interesaj verkoj. La prezentado estas farita tiel ke kelkaj aferoj komunaj por ili ambaŭ estas pritraktitaj.

Volo helpi la homaron al paco

Oni povas diri ke Martinus kaj Zamenhof havis saman celon, nome: helpi la homaron al paco. Por ni esperantistoj ja estas pli-malpli konate ke Zamenhof multe revis pri esperanto kaj la esperatismo kiel ilo por pacigi la mondon. Ekzemple dum parolado en Kemбриĝo Zamenhof diris:

"Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn..."

Multaj ankaŭ scias ke Zamenhof havis pliajn ideojn pri paco inter la gentoj, kiujn li prezentis sub la nomo "homaranismo". Verŝajne ne estas same konate ke la dano Martinus ankaŭ volis helpi la homaron al paco per sia verkaro. Lia kosmologio estas, laŭ li mem, granda helpo al paco. Tio interalie esprimiĝas en la antaŭparolo de lia ĉefverko "Livets Bog" (La Libro de Vivo).

"...ne troviĝas iu pli forta elvokiga momento aŭ bazo por kreado de tiu tra la tuta mondo tiel sopirata 'daŭra paco' ol ĝuste la rezulto de tiu studado aŭ la scio pri la analizo de la kosma universo..."

Lia klopodo helpi la homaron al paco konsistas el analizoj de la fizika kaj spirita mondoj kiuj donas teoriajn klarigojn pri la vivo montrante ke la plej alta agmaniero estas "amu unu la alian".

"Kredo" je esperanto kiel la mondlingvo

En la artikolo "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia" Zamenhof venas al la sekvantaj konkludoj:

- 1 La enkonduko de lingvo internacia alportus al la homaro grandegan utilon.
- 2 La enkonduko de lingvo internacia estas tute ebla.
- 3 La enkonduko de lingvo internacia pli aŭ malpli frue nepre kaj sendube efektiviĝos, kiom ajn la rutinistoj batalus kontraŭ tio ĉi.
- 4 Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo ol arta.
- 5 Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom esperanto; ĝi aŭ estos lasita por ĉiam en ĝia nuna formo, aŭ en ĝi estos poste faritaj iaj ŝanĝoj.

La artikolo, kiu interalie troviĝas en "La Fundamenta Krestomatio", vere estas leginda kaj bone motivigas la suprajn punktojn. Zamenhof verkis ĝin sub la pseŭdonimo "Unuel" kaj ĝi estis laŭtlegita en formo iom ŝanĝita kaj mallongigita dum kongreso en Parizo 1900.

Ankaŭ Martinus estis sufiĉe certa pri esperanto kiel la lingvo internacia. Tio vidiĝis dum koncilia kunsido en lia Instituto en 1974 kiam li diris:

"Mi opinias ke ni estas iom fruaj pri esperanto, sed alie ĝi estas tre bona. Sed ĝi venos iam, kaj tiam estos grandioze. Estus ja bone, se ĝi venus rapide. Sed estos esperanto. Kio alie? Ĉu troviĝas aliaj lingvoj pli progresintaj? Neniu alia lingvo estas same humana. Oni rigardu la kreinton. Li ja estis treege humana homo. Oni preskaŭ povas vidi, ke li estis elektita tion fari."

La Martinus-Instituto, kiu eldonas liajn librojn kaj "protektas" lian verkaron, jam antaŭ multaj jaroj elektis esperanton kiel sian internacian lingvon. La instituto ankaŭ eldonis kelkajn librojn en esperanto kaj en la estonteco ĉiuj libroj estos tradukitaj kaj eldonitaj en la internacia lingvo.

Spiritaj travivaĵoj

Mi supozas ke oni povas nomi la travivaĵon*, kiu influis Zamenhof multe spirita. Jen liaj propraj vortoj pri ĝi:

"Ĉio, kion mi nun skribas, naskiĝis en mia kapo ne nun, sed antaŭ kvardek jaroj, kiam mi havis la aĝon de 16-18 jaroj; malgraŭ ke mi de tiu tempo multe meditis kaj legis diversajn sciencajn kaj filozofiajn verkojn, miaj tiamaj pensoj pri Dio kaj pri senmorteco preskaŭ tute ne ŝanĝiĝis."

"Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero ...; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo ...; ke io min gardas al alta celo..."

Ambaŭ ĉi tiuj citaĵoj estas de teksto kiun li skribis ĵus antaŭ sia morto. La lasta neniam estis finskribita kaj nur troviĝis kiel noto. Pri ĉi tiu noto Privat, kiu estis bona amiko de Zamenhof, skribas:

"Tiu estas lastaj vortoj de l' skribaĵo. Mortante, Zamenhof forportis la sekreton sian. Ni nur scias, ke junule li ektrovis propran kredon, ke li akiris senŝancelan fidon je unu forto komuna por amo kaj inspiro al konsciencoj, ke li tiel havis "Dion en la koro", ke li komprenis la daŭrecon de l' spirita laborado trans la morto, kaj rigardis la diversajn homajn religiojn kvazaŭ malsamajn vestojn de unu sama vero."

La spirita travivaĵo de Martinus signifis multege por li kaj tute ŝanĝis lian vivon. Pri tio oni povas legi en la libreto "Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio". Jen citaĵo el ĝi, kiu priskribas la efikojn de unu el liaj spiritaj travivaĵoj, "la ora fajrobapto":

"La ora lumo postlasis en mi plenan konscion pri mia senmorteco kaj la kapablon konstati, ke nur vivo ekzistas, ke mallumo kaj sufero estas nur vualita amo, kaj ke Dio ĉeestas en ĉiuj kaj en ĉio."

Post ĉi tiuj travivaĵoj, kiujn li ofte nomas "la granda naskiĝo", li ekhavis "kosman konscion". Tiu "kosma konscio" signifas, laŭ Martinus, ke oni havas kapablon povi respondi ĉiujn demandojn pri la vivo per la intuicio. Pri "la granda naskiĝo" li opiniis ke absolute ĉiuj trairos ĝin pli malpli frue, kiam la amkapablo estas tute finevoluinta. Por ni surteraj homoj tio verŝajne ne okazos dum ĉi tiu surtera vivo sed laŭ Martinus ni renaskiĝos kiel surteraj homoj multajn fojojn por denove fari spertadon kaj daŭrigi

nian evoluon al "la finevoluinta homo laŭ la bildo de Dio".

Martinus nomis sian tutan verkaron "La Tria Testamento" kaj ĝi konsistas el diversaj libroj kiuj kune enhavas proksimume 3000 paĝojn de tekstoj kaj bildoj. La ĉefverko estas "Livets Bog" ("La Libro de Vivo") kiu havas sep volumojn kaj priskribas la plej gravajn analizojn liajn. Por faciligi la studon de sia kosmologio li ankaŭ de-

Nomo: Martinus
Sur la tero: 1890
– 1981

Loĝlando:
Danlando
Mallonga
vivhistorio:
elkreskis en kampara vilaĝeto; trapasis bazan lernejon; laboris kiel laktajisto kaj kalkulisto; havis spiritajn travivaĵojn (1921); liberigis de sia laboro kaj komencis desegni simbolojn kaj skribi kosmajn analizojn; verkis kaj prelegis ĝis sia morto.



segnis simbolojn pri la analizoj. 44 da ili troviĝas, kune kun klarigaj tekstoj, en "La Eterna Mondbildo" kiu venis en esperanto dum 1998. Liaj analizoj traktas multajn diversajn temojn, ekzemple: la venontan mondregnon; la evoluon de la estaĵo; reenkarmoniĝon; karmenon; virinojn kaj virojn; nutraĵojn; eldirojn de Jesuo; mikro-, mez- kaj makrokosmon; la spiritajn mondojn kaj Dion. Por verki siajn analizojn Martinus uzis intuicion kaj inteligenton por ke estu logikaj pensoĉenoj kaj ne nur dogmoj. Laŭ li la verko estas intelektigita kristanismo kaj spirita scienco. Do li ne volis ke oni kredu lin blinde sed ke oni mem esploru kaj prijuĝu la aferojn.

Krom esperanton, Zamenhof verkis aliajn aferojn, interalie la hilelismon kaj la homaranismon. Ĉi tie mi volas citi D-ron Dietterle, kiu kunmetis la libron "Zamenhof Originala Verkaro":

"La tre ideala homaranisma ideo okupis lin dum lia tuta vivo, kaj - kiel ŝajnas al mi - por li estis ankoraŭ pli grava, ol la tuta ideo de internacia lingvo, kiu evidente servis al li nur kiel vojo al la ideala celo, kiun li esprimas per la preskaŭ sinonimaj vortoj 'hilelismo' kaj 'homaransimo'."

Jen du citaĵoj de Zamenhof kiuj priskribas la ideon:

"... la homaranismo estas speciala kaj tute difinita politika-religia programo, kiu prezentas mian kredon pure privatan kaj la aliajn esperantistojn tute ne koncernas."

"La homaranoj esperas, ke per konstanta reciproka komunikado

sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon, sed tio ĉi fariĝados iom-post-iom, nerimarkate kaj sen ia rompadon."

La homaranismo estas difinita en dek du punktoj kiuj, mallonge dirite, priskribas kiel grave estas ke homoj estas egale traktataj sendepende de lingvo, lando, religio kaj raso. La hilelismo estis verkata antaŭ la homaranismo kaj koncernas nur la judojn dum la homaranismo koncernas ĉiujn popolojn kaj religiojn.

Studejoj de iliaj verkoj

Mi supozas ke la legantaro jam scias ke troviĝas multaj eblecoj studi la lingvoverkon de Zamenhof, interalie per studlibroj, kasedoj, vidbendoj kaj kursoj en la Interreto, esperanto-kluboj, popolaj altlernejoj, gimnazioj kaj eĉ universitatoj en kelkaj landoj.

Por studi la verkon de Martinus ne troviĝas same multaj eblecoj. Sed tamen ekzistas kelkaj studejoj kie eblas studi lian kosmologion. La plej granda estas Martinus-Centro en Klint, Danlando. Tie oni povas studi dum la someroj, aŭtunoj kaj printempoj. Dum du semajnoj en 1997 la instruado estis tute en esperanto. Dum la aliaj kurssemajnoj eblas partopreni lingvolernajn komencantajn kaj daŭrigajn kursojn en esperanto.

Proksimume en 50 urboj sur la tero estas regulaj prelegoj pri la Kosmologio de Martinus (1997).

Ne adorado de iliaj personoj nek sektigado

Neniu el ili volis ke iliaj personecoj estus objekto por adorado. Tio esprimiĝas en la jenaj citaĵoj:

"... mi absolute ne deziras nek celas, ke oni pri mia persono 'kredu' ion ajn."

"Ĉian eventualan kultadon al mia persono mi ĉiel kontraŭbatalas, celante sole agnoskon de la fakta ekzisto de la sankta spirito."

Tion skribis Martinus. Pri Zamenhof mi ne trovis eldiron de li mem pri adorado sed lia amiko Edmond Privat skribis:

"Tiel (la Majstro) ĉiuj nomis lin. Sed li ne ŝatis la titolon. Morale, eĉ preskaŭ fizike, la vorto ĝenis lin. Ne majstro, sed homfrato kaj kolego li volis esti."

Kvankam ke oni povas fariĝi membro en diversaj esperantokluboj, UEA k.t.p., nek esperanto nek la esperantismo temas pri sektajo. Same pri la Kosmologio de Martinus, tie eĉ ne eblas nek eblos membriĝi en ia organizo. Ankaŭ ne troviĝas iaj ajn ceremonioj rilate al ĝi.

Pli da informoj

Se iu volas scii pli pri la homaranismo kaj la aliaj projektoj de Zamenhof mi

rekomendas la libron "Zamenhof Originala Verkaro" kiu enhavas leterojn, parolojn, antaŭparolojn kaj artikolojn de Zamenhof. Ankaŭ troviĝas du, speciale menciindaj, biografioj pri Zamenhof, nome: "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat kaj "Zamenhof" de Marjorie Boulton.

Por studi la Kosmologion de Martinus, en esperanta lingvo, troviĝas kelkaj libretoj, la gazeto revuo "Kosmos" kaj ankaŭ la simbolibro "La Eterna Mondbildo". Eblas mendi librojn kaj provnumeron de "Kosmos" ĉe:

Martinus-Instituto
Mariendalsvej 96
DK-2000 Kopenhago F
aŭ per retpoŝto:
martinus@centrum.dk

Troviĝas ankaŭ esperantaj ttt-paĝoj (www.esperanto.nu/retkosmo) pri la kosmologio de Martinus.

Tiu travivaĵo, kiu "savis" Zamenhofon el adoleska promateriisma krizo kaj deprimiĝo, dum kiu li ĉesis labori pri la mondlingva projekto, verŝajne donis al li tiujn bezonatajn eltenemon, forton kaj inspiron kiuj ebligis lian postan vivoverkon. [Komento de Retkosmo]

Håkan Lundberg

Latvia Internacia Printempo

Latvia Internacia Printempo - "Kasteloj de Livonia Kruckavaliroj en Latvio" 27.5 - 31.5 1999

27.5 jaŭdo Alveno al Riga. Vespera urborigardado, Interkona Vespero, dancvespero. Tranokto.

28.5 vendredo Ekskurso al fama, pitoreska, turisma loko Sigulda 70 km de Riga. Internacia vespero kun Riga kaj Cesis Esperanto-Kluboj. Tranokto en Priekuli.

29.5 sabato Veturo al Cesis, partopreno en teatraĵo de kruckavaliroj en palacruinoj de Cesis, urborigardado.

30.5 dimanĉo Veturo al Kalncempji. Vizito de Vidzeme regiona vilao-muzeo. Aluksne, urborigardado. Tranokto en Gaujiema.

31.5 lundo Konatiĝo kun historio de Gaujiema. Reveno al Riga.

Mara Timermene
Kr. Valdemara 145/1-32
Riga
LV-1013
Latvio
tel. 009-371-7361395

Vizito en Japanio

KORESPONDU KUN JAPANIO

Kiel gajni korespondanton en Japanio.

1. Akcepto de korespondpetoj. Akceptataj estas individuaj korespondpetoj kun japana esperantisto per la internacia lingvo Esperanto.

2. Kondiĉo de korespondpetoj. Kosto por havi 1 japanan korespondanton estas 2 Internaciaj Respondo-Kuponoj (IRK).

Laŭeble tajpu (aŭ skribu preslitere). Skribu petleteron per propra lingvosocio.

Nepre necesaj informoj:

a) Sinprezento; nomo kaj adreso (senmallongige laŭ nacilingva ortografio kaj ordo), lando, sekso, jaraĝo, profesio, fako, ŝatokupo.
b) Kondiĉoj pri korespondanto en Japanio; sekso, jaraĝo, profesio, fako, ŝatokupo, temo.

Koresponda Servo de
Japana Esperanto-Instituto
Tōkyō-to
Sinzyuku-ku
Waseda-mati 12-3
162-Japanio/
Nippon

La du svedaj esperantistinoj Anita Bergh kaj Agneta Emanuelsson de la 3-a ĝis la 17-a de oktobro 1998 faris viziton en Japanio. Jen rakonto pri iliaj impresoj de la lando kaj ĝia esperantistaro.

Je la naŭa matene ni surteriĝis en la grandega flughaveno Narita. Por atingi la pasportan kontrolon ni veturis per senkondukista trajno. Tiam ni eksentis, ke ni alvenis ne nur al la lando de supreniranta suno, sed ankaŭ al la lando de plene evoluinta teknologio. Per eksprestrajno ni rapidis al la 85a Japana Esperanto-Kongreso en Kanazawa. Iom ni sentis nin trompitaj, ĉar estis multaj neokupitaj lokoj en la vagono. Laŭ nia antaŭa kompreno la trajnoj en Japanio ĉiam estas plen-plenaj!

Bedaŭrinde, ni maltrafis la tutan programon la unuan tagon, ĉar ni nur alvenis ĝustatempe al la bankedo vespere. Centoj da esperantistoj, muziko, kantado, dancado, tamburistoj, drumistoj, japana manĝaĵo! Estis kapturita travivaĵo! La duan tagon ni jam pli trankvile konatiĝis kun ĉio kaj ĉiuj. Partoprenis tamen 470 esperantistoj el kiuj ĉirkaŭ dek eksterlandanoj.

Ni eksterlandanoj estis invitataj de Oomoto vesti nin japane. La foto de nia mallonga kariero de japaninoj estas agrabla memoraĵo, kiu i.a. tre imponas al niaj geamikoj. Verŝajne kimono tre taŭgas al ni, sed estis tiel malfacile moviĝi bele kaj gracie. Poste ni vizitis la kimono-muzeon en Kyōto kaj rigardis modprezentadon de belegaj kaj riĉornamitaj kimonoj. Ni kun spertaj okuloj ĝuis la leĝerecon per kiu la modelinoj moviĝis surscene.

Japanio estas lando de kontrastoj, lando de diversaj tempoj samtempe. Post la kongreso ni veturis al najbara urbeto por rigardi 800-jaran festivalon okaze de la rizrikolto. La vojon tien montris nin aŭta elektrona sistemo kvazaŭ de la estonteco.

Komencis nia odiseado tra Japanio organizita de la japana esperantistaro en la 10-a monato de la 10-a jaro laŭ la loka kalendaro. Ni trajnadis kaj je ĉiu antaŭdecidita stacio atendis nin esperantisto aŭ esperantistoj. Ni partoprenis esperanto-renkontiĝojn kaj estis prizorgitaj de esperantistoj en Kyōto, Uzi, Kameoka, Hirosima, Sakaida, Takamatsu, Yokohama, Misima, Tōkyō kaj Chiba. Por ni restis nur la

tasko ĝui la mirandan gastamecon kaj la varman senton esti en fremda lando de fremda kulturo, sed samtempe hejme, unuvorte en Esperantujo! Kompreneble, lingva problemo ne ekzistis por ni!

Dum nia vizito al la Oomoto-centro en Kameoka ni havis la plezuron partopreni tradician te-ceremonion aŭ ĉanojon. Denove ni sentis la evidentan aliĝon al preskaŭ miljara tradicio, kiu dum jarcentoj perfektigis por doni harmonion kaj trankvilon al homoj.

La gaja renkontiĝo kun la junaj komencantinoj de esperanto en la Oomoto-centro estis vere inspira kaj ĝoja parto de nia vojaĝo. La aktivaj knabinoj simbolis ligilon al la estonteco! Ĉu ni iam renkontiĝos estonte por jam babili esperante? Ni ŝatus tion fari.

Hirosima. Nur la nomo de la urbo entenas tiom da fortaj sentoj de homa teruraĵo, ke ne eblas eĉ ĝisfunde kompreni. La impresoj de la objektoj en la muzeo estis fortaj, sed la plej forta impresoj estis tamen okaza surloke kaj vidi florantan, belan urbon sciante, ke homoj ĝis nun suferegas pro la bombo. Ni eliris de la muzeo kaj strange la suno ankoraŭ brilis, kvazaŭ nenio okazis antaŭ pli ol 50 jaroj. Nenio, kio por generacioj influos la vivon de multaj homoj. Ni memoru, por ke ni ne ripetu. Jen, la mesaĝo al la tuta mondo!

La deka tago de la deka monato de la deka jaro ŝajne estis tago de feliĉo kaj sekve aparte taŭga por geedziĝo. Ni ankaŭ estis feliĉaj, ĉar hazarde ni troviĝis ĉe la fama Itsukushima templo sur la Miyajima insulo por havi la eblecon vidi japanan nuptceremonion laŭ tradicia formo. Ĉiuj edzinoj krom la novelzino portis nigran kimonon, la plej formalan vestaĵon. Por ni tio montris, ke homo mem aldonas specifan signifon eĉ al koloroj, ĉar ĉe ni virino kutime evitas vesti sin nigre je nupto. Tamen nigra kimono estas tre eleganta vestaĵo!

Ni trapasis la Seto Ohashi-ponton, kiu ligas la insulon Sikoku kun la ĉefa parto de Japanio. Estas grandioza



konstruaĵo de nia tempo, fratino de la Golden Gate-ponto en San Francisco. La muzeo dediĉita al la ponto uzas la plej novan teknologion por montri la konstruadon de la ponto, pri kiu revis pioniro jam antaŭ cent jaroj!

Ĉiutage manĝaĵo estis bela kaj bongusta enigmo. La rizon kaj la nudelojn ni rekonadis tuj, sed la aliaj pladoj ofte estis novaĵoj por ni. Precipe ĉar la tuto estis tiel bele arganĝita sur la pleto, ni la unuaj tagoj eĉ timis detruai la belecon nesciante kiamaniere komenci! Uzi bastonetojn fariĝis nature por ni kaj ni sentis eĉ iom da malkomforto, kiam ni foje uzis forkojn!

Jes, multon ni vidis, multon ni travivis, sed ni ankoraŭ ne salutis Fuji-san! De la trajno de malproksime ni vidis lin. La posta tago estis griza kaj pluvigis. Fuji-san kaŝis sin por ni! Kiel kompreni tian ĉi konduton? Unue ni malĝojis, sed subite ni ekkomprenis. Ni ankoraŭ ne estis pretaj. Ni fakte nur gustumis Japanion. Konatiĝi kun Fuji-san ni rajtos espereble venontfoje! Do, ĉiuj novaj geamikoj:

Elkoran dankon kaj ĝis la reveno!

Anita Bergh
Agneta Emanuelsson

¿Runa simita parlankichu?

Profilo de la "inka-lingvo"

Laŭ arkeologoj la unuaj enloĝantoj en la "nova mondo" enmigris de la nuna Siberio dum varma periodo antaŭ pli ol 30 000 jaroj. Do ni ne povas atendi ian specialan similecon inter la plurcentoj da lingvoj ankoraŭ parolataj en la amerika duopa kontinento. Tute certe ekzistas pluraj lingvaj familioj.

La nura kulturo kiu evoluigis propran skribarton estis la maja popolo en Centrameriko.

Kiam la hispano Francisco Pizarro la duan fojon revenis al "Peruo" por serĉi Eldoradon, la landon de la oro, estis en la jaro 1526, li trovis ke tie regis imperiestro, la Inkao, super ege vasta regno nomata *Tawantinsuyu*, kio signifas "kvarparta lando". Ĝia ĉefurbo estis *Kosko* (*Cuzco* en la hispana) kiu signifas "centro".

Oni kalkulis ke la enloĝantoj de la regno estis pli malpli 12 milionoj.

La administran lingvon de la vasta lando oni simple nomis *runa simi*, homo-lingvo. Verŝajne la hispanoj havis ege malbonajn interpretistojn, ĉar ili adoptis la nomon *quechua*, keĉua, por tiu lingvo. *Kechwa* estis tribo kiu sin dediĉis al la farado de ŝnuroj, *kechway*. El jenaj ŝnuregoj oni faris longajn pendantajn pontojn super la abismoj de la Andoj.

Oni ne konis la radon sed konstruis vojreton laŭlonge la regnon por la transporto de varoj per lamo-karavanoj.

Tawantinsuyu estis terkultura kaj paŝtista socio. Inter kultivitaj plantoj etis maizo, terpomo, fazeolo, *kinwa* (semoj de kenopodiaco), manioko, ternukso, avokado, papriko, patato, ananaso, ĉerimolio k.t.p., kiuj nun estas gravaj produktoj en la tuta mondo. El tiuj nur la nomo de la frukto ĉerimolio venas de la keĉua. La nomo de la terpomo, papa, pasis en la hispanan.

La dombestoj estis ĉefe la lamo, la alpako, la porko, la kobajo kaj la hundo.

La fero estis konata, sed ne uzata pro la rustemo. Ankaŭ stanon, kupron, arĝenton kaj oron oni konis kaj uzis. La lastajn nur por ornamaĵoj, neniam kiel pagilon. Oni simple interŝanĝis varojn. Oni eltrovis la decimalan nombrosistemon kaj kiel kalkulon uzis la kipuon, aron da koloraj ŝnuroj kun nodoj fiksataj je tigo.

Do, ni rigardu iom internen de tiu

lingvo ankaŭ nomata la "inka-lingvo". Ĉi tie nur en ties perua formo.

La keĉua apartenas al la sama lingvofamilio kiel la tupia, la gvarania, kaj la ajmara kies strukturoj estas forte aglutinaj. (Inter eŭropaj lingvoj la finn-ugra familio simile aspektas).

Estas neeviteble ke lingvo parolata en tiel disaj regionoj kiel Peruo, Bolivio, Ekvadoro kaj Kolombio havu diversajn dialektojn. Tamen oni interkonsentis pri la jena sonsistemo laŭ la hispana ortografio:

La keĉua	a c h e i j y k l ll	m n ñ o p q r s sh t u w
Esperanto	a ĉ e i ĥ j k l ll	m n nj o p kh r s ŝ t u ŭ

Ni notas ke la keĉua samkiel esperanto havas kvin vokalojn: A E I O U.

Diftongojn formas *au* kaj *ia*: *Chau-cha*, fruterpomo; *usiay*, fini.

La vortakcento estas ĉiam en la antaŭlasta silabo, krom en certaj esprimoj.

Provu elparoli: (vortelemantoj disigitaj) ¿*Esperanto-ta parla-nki-chu*? Ĉu vi parolas esperanton?

La substantivo

Difina artikolo ne ekzistas
Nedifina artikolo: *Juk*

La substantivo ne havas specialan markon. La pluralon formas partikulo *-kuna*

Ekz: *Qari*, viro; *qari-kuna*, viroj.

Same kiel en esperanto la keĉua havas la kazojn nominativo, genitivo, dativo kaj akuzativo. La ablativon esperanto esprimas pere de prepozicioj. Kazo estas formo de substantivo, pronomo aŭ adjektivo, kiu indikas ĝian rilaton al aliaj vortoj en la frazo, aŭ ĝian funkcion: loko, tempo, maniero, instrumento, kaŭzo, manko de io, k.t.p.

En la keĉua la kazoj esprimiĝas ĉefe per sufiksoj.

Ekzemplo:

Nom.	<i>Mayu</i>	rivero
Gen.	<i>Mayu-p</i>	de l'rivero
Dat.	<i>Mayu-paq</i>	por la rivero
Akuz.	<i>Mayu-ta</i>	riveron
Abla.	<i>Mayu-manta</i>	el la rivero
"	<i>Mayu-kama</i>	ĝis la rivero
"	<i>Mayu-pi</i>	en la rivero
"	<i>Mayu-wan</i>	kun la rivero
"	<i>Mayu-man</i>	al la rivero
"	<i>Mayu-rayku</i>	pro la rivero
"	<i>Mayu-nta</i>	laŭ la rivero

Je pluralo ties partikulo antaŭiras

iun kazopartikulon: *Warmi-kunawan*, kun la virinoj.

La adjektivo

Adjektivoj ne havas specialan markon. Nek formas pluralon, nek havas kazajn formojn. Normale ĝi antaŭiras la substantivon. Ekz.: *Sumaq warmi-kuna-paq*, "por la belaj virinoj".

Posesivaj adjektivoj ne ekzistas. Anstataŭe ni trovas posesivajn partikulojn:

-y, mia; -yki, via; -ñ, lia/ŝia/ĝia; -nchis,

nia (inkluziva); -yku, nia (ekskluziva); -nku, ilia.

Ekz.: *Mama-yki*, via patrino; *taita-yku*, nia patro (nur de la interparolantoj).

Personaj pronomoj

ñoqa mi
qam vi
pay li, ŝi, ĝi
ñoqanchis ni (inkluz.)
ñoqayku ni (ekskluz.)
qamkuna vi
paykuna ili

Same kiel substantivoj tiuj pronomoj havas kazojn: *ñoqa-wan*, kun mi. Se la konteksto sufiĉas, oni povas el-lasi la pronomojn.

La verbo

La verban sistemon ni devas grandparte preterlasi, sed ni povas konstati ke ekzistas nur unu konjugacio.

La infinitiva finaĵo estas la konsonanto -y.

Helpverbo estas *kay*, esti. La simpla kopulilo estas partikulo *-m*, *-mi*. Ekz.: *Pay-mi Suecia-manta*, Li estas de Svedio.

Verboj havas personajn finaĵojn. La prezenco uzas nur tiujn finaĵojn:

Ekz.: <i>Rima-y</i> , paroli.	
<i>Ñoqa rima-ni</i>	Mi parolas
<i>Qam rima-nki</i>	Vi parolas
<i>Pay rima-n</i>	Li parolas
<i>Ñoqanchis rima-nchis</i>	Ni parolas
<i>Qamkuna rima-nkichis</i>	Vi parolas
<i>Paykuna rima-nku</i>	Ili parolas

Preterito formiĝas per la infikso *-rqa-*
Ekzemplo: ¿*Qam rima-rqa-nki-chu*? Ĉu vi parolis?

Speciala trajto estas la duobla negacio: *mana (m) ... chu*. Ekz.: *Qam*

manan Kosko-manta ka-nki-chu, Vi ne estas de Kusko.

Prepozicioj

En la keĉua ekzistas praktike nur kvar prepozicioj: antaŭ, malantaŭ, super kaj sub. La ceterajn anstataŭas postpozicioj aŭ sufiksoj

Ekz.: *Wasi-y-manta*, el mia domo.

La vortordo preferinde estas: Subjekto - Objekto - Verbo.

Vortfarado per afiksoj (aglutinado)

Tiel esperanto kiel la keĉua uzas partikulojn aŭ afiksojn por krei novajn vortojn. Tiujn oni nomas prefiksoj antaŭ la radiko kaj sufiksoj post la radiko. Esperanto uzas kaj prefiksojn kaj sufiksojn, la keĉua nur sufiksojn. En esperanto la afiksoj povas funkcii kiel memstaraj vortoj. Tio ne eblas en la keĉua. En la du lingvoj la afiksoj povas esti "ĉen-kuplitaj". Oni do parolas pri infiksoj.

Jen listo de kelkaj prefiksoj en esperanto kaj la korespondaj sufiksoj en la keĉua.

Esperanto La keĉua

dis- doni / disdoni
ek- flori / ekflori
maizo)
fi- homo / fihomo
re- semi / resemi
retro- iri / retroiri

PREFIKSOJ SUFIKSOJ

-ykacha- qoy / qo-ykacha-y
-ri- parway / parwa-ri-y (ekflori)
siki runa / runa-siki (siki=postajo)
-pa- tarpuy / tarpu-pa-y
-pu- riy / ri-pu-y

Ĉi-sube sekvas paralela selekto de sufiksoj aŭ korespondaj vortoj el la du lingvoj. (Observu la neregulan uzon de la partikulo *-na* en la keĉua)

SUFIKSOJ

-aĉ- hundo / hundaĉo
-ad- rigardi / rigardadi
-aj- manĝi / manĝajo
-end- fari / farenda
-an- vilaĝo / vilaĝano
-ar- ŝtono / ŝtonaro
-ĉj- Petro / Peĉjo
-ebl- fari / farebla
-ec- ruĝa / ruĝeco
-eg- ŝtono / ŝtonego
-ej- kuiri / cuirejo
-em- dormi / dormemo
-estr- domo / domestro
-et- domo / dometo
-ig- morti / mortigi
-iĝ- nokto / noktiĝi
-il- tranĉi / tranĉilo
-ist- kanti / kantisto
-ul- koni / konatulo

SUFIKSOJ

siki allqo / allqo-siki
-paya- qaway / qawa-paya-y
-na mikuy / miku-na
-na ruray / rura-na
-masi llaqta / llaqta-masi
(duobligo) rumi / rumi-rumi
-cha Pedru / Pedrucha
-na ruray / rura-na
-niraq puka / puka-niraq
-sapa rumi / rumi-sapa
wasi yanuy / yanu-na wasi (domo)
-naya puñuy / puñu-naya
kamayu wasi / wasi-kamayu
-cha wasi / wasi-cha
-chi- wañuy / wañu-chi-y
-ya- tuta / tuta-ya-y
-na kuchuy / kuchu-na
-q takiy / taki-q (participo)
-masi reqsiy / reqsi-naku-q-masi

La keĉuaj virinoj majstras la teksarton. Ili konas 33 nuancojn de la ruĝa koloro!
Foto: Hans Ramstedt, UBV



La keĉua multe pli ol esperanto utiligas tiajn partikulojn. Vi eble jam vidis ke la demandopartikulo hazarde same kiel en esperanto estas *-chu*, nur ke ĝi venas poste.

En la keĉua de Bolivio la substantivo povas esti modifita per 70 diversaj partikuloj. Se vi aldonas partikulojn de verboj vi povas konstrui pli ol 12.000 vortojn el la sama radiko!

Jen kelkaj keĉuaj vortoj kiuj fariĝis internacie konataj:

Alpaka, alpako
Chirimoya, ĉerimolio
Inka, Inkaio
Llama, lamo
Kuntur, kondoro
Pampa(s), ebenaĵo
Copacabana = Blua vidaĵo
Rimaq ("La parolanto", nomo de rivero), Limo.

Sulla-ku-lla-ni kay-ta runa-masi-y-kuna-paq kusi-ku-y-ta. Mi nur esperas ke tio-ĉi estis interesa por miaj samideanoj.

Ingvar Enghardt

Problemen lösta med våra bokstäver

KOREKTO

En la lasta numero de La Espero (5-6/1998 p. 9) forfalis la lasta linio de la lasta kanto pro "komposta" eraro. Eble niaj legantoj jam kristnaske divenis la finon: "... ĉar intertempe estos fasto"

Problem med esperantos övertecknade bokstäver har väl drabbat oss alla som tagit steget från skrivmaskin till datorn. Men nu finns det en universell lösning som kommer att tillämpas för alla typer av datorer och som heter Unicode. Det är ett system där alla bokstäver och andra tecken ifrån alla världens språk ryms. Följaktligen finns även de sex esperantobokstäverna med, stora som små.

Unicode finns med i Windows 95, sista versionen. Den som har de två första versionerna kan gratis få hem uppgraderingen (osr 2) via internet från Microsoft. Windows 98 har med Unicode från början och Mac-datorerna får det enligt uppgift med nästa systemversion. Med Unicode fungerar många av de fonter eller teckensnitt som ingår i Windows, man behöver alltså inte längre skaffa några speciella esperantofonter eller program för att skriva esperanto. (Ett enkelt sätt att se om en font är av den nya Unicode-standard är att se efter hur stor den fil är som innehåller fonten. Är den under 100 kilobyte håller den inte det nya måttet, är den betydligt större än så är det med största säkerhet en Unicode-font.)

Den som har Windows behöver också ett kraftfullt ordbehandlingsprogram som klarar Unicode, exempelvis Word, den version som ingår i Office -97.

Relativt lättinstallerat

Är man lycklig ägare till Windows 95 (sista uppgraderingen) eller 98 och Word, är det ganska lätt att ordna sina esperantotecken. Anders Bertse, datastuderande musiker från Vaxholm, förklarar hur:

Först måste man komplettera Windows med "Multilingual Support", som normalt inte installeras på svenska datorer men som finns med på senare versioner av Windows CD-romskiva. Man installerar den genom att gå till Inställningar / Kontrollpanelen / Lägg till/ta bort program. Sedan öppnar man Word för Windows och går till "Infoga". I den "rullgardinen" finns "Symbol...", som öppnar ett fönster.

Upe till höger kan det stå exempelvis "Utökat latin A". Känn dig glad, så här långt är det rätt. Till vänster ska det stå "Teckensnitt: normal text. Nu hittar du kanske först, nere till vänster i fönstret, Ĉ och ĉ. Det tar inte

lång stund att hitta samtliga tolv esperantotecken.

Återstår att installera dem. Markera en bokstav, exempelvis ĉ, genom att klicka på den. Klicka sedan nedanför på kortkommando. Upp dyker ett nytt fönster. Där syns ĉ på en markerad rad. Gå till rutan "Ange nytt kortkommando", markören står nog redan där. Nu gäller det att välja vilka tangenter som ska tryckas i fortsättningen för att datorn ska skriva ĉ. Massor av möjligheter står till ditt förfogande. Själv har jag valt att hålla ner Alt och skriva c. Efter att ha valt en kombination klickar du på koppla, varefter du kan stänga fönstren under infoga och skriva ĉ i Windows.

För stora Ĉ (versala heter det egentligen) har jag valt att hålla ner Alt+Shift och skriva C. Du väljer själv. Och man kan ångra sig och göra om proceduren. Sedan är det bara att gå vidare och göra om samma sak med tio andra tecken.

Därefter är det bara att skriva esperanto, det fungerar i de flesta vanliga fonterna. Relativt lätt, sade jag visst. Alla har vi olika stor vana vid datorer. Om du inte tycker att detta är relativt lätt så är det inte det för dig, ännu. Då blir det väl att be någon som redan har större vana.

Bengt Nordlöf

Mia vivo en Tanzanio

El Tanzanio, lando kun kiu ni havas apartan rilaton, venis letero. Estas juna esperantisto, kiu mallonge priskribas sian vivon kaj vivkondiĉojn, dokumento kiu devus altiri la atenton de homoj kiuj nur kutimas informiĝi pri la malriĉaj landoj per la novaĵdissendoj de niaj amaskomunikiloj.

Mi naskiĝis en la jaro 1971. Mi estas la sesa filo en familio kiu havas 9 gefilojn. Miaj gepatroj estis terkultivistoj kiuj malriĉe vivis.

En la jaro 1981 mi ekvizitis la elementan lernejon, la unuan klason en Kangetutya elementa lernejo. En la jaro 1987 mi finlernis la sepan klason, kiu estas la lasta klaso de la elementa lernejo. Mi faris la ekzamenojn por iri al la duagrada lernejo, sed bedaŭrinde mi ne sukcesis trapasi la ekzamenojn.

Do mi devis vivi kun miaj gepatroj en la vilaĝo, kaj mi okupiĝis pri terkultivado. La familio ne havis bovojn por tiri la plugilon, pro tio mi devis ĉiam kultivi mane. Tiu laboro vere estas tre malfacila kaj kelkfoje la rikolto estis malbona pro manko de pluvo aŭ pro la insektoj kiuj formanĝis la plantojn. En mia regiono oni kultivas maizon, milion, kasavon, dolĉan terpomon kaj kotonon.

En la jaro 1994 mi kultivis unu hektaron da kotono. La rikolto ne estis bona pro manko de pluvo. Tamen

mi sukcesis rikolti nur 250 kilogramojn da kotono, kiujn mi vendis kontraŭ 12.500 tanzaniaj ŝilingoj (proksimume 200 svedaj kronoj). Per tiu mono ni decidis funkciigi komerceton por vendi sardinojn (malgrandaj fiŝetoj). Tiu komerco ne donis bonan profiton. Dumtempe la sekeco ĉesis kaj venis la veterŝanĝo, nomita El Niño, kiu enhavis multe da pluvo. Tiuj inundoj malsekigis la teron. En la vilaĝo multaj domoj dronis kaj falis. La tero estis plenplena de akvo. Pro tio neniu kultivis kaj la plantoj miskreskis kaj flaviĝis.

Ankaŭ mia domo falis kaj mi devis fuĝi al la urbo Bunda kun mia familio por serĉi laboron. Mi ne havas specialan profesion kaj pro tio mi dungigis kiel helpanto de konstruisto (ekde junio ĝis septembro 1998). Tiu laboro estis tre peza kaj mi gajnis tre malmulte da mono kiu vere ne sufiĉis por miaj familiaj bezonoj. Tamen per tio plus la mondonacoj de eksterlandaj esperantistoj mi povis vivi kun mia familio.

Ekde septembro mi ne plu laboras kaj pro tio mia vivo en Bunda estas malfacila pro manko de mono. Tamen mi daŭre serĉas laboron kiu povas helpi min nutri mian familion.

Esperanto

En la jaro 1992 mi esperantistiĝis kaj lernis la lingvon en la Esperanta klubo de Kangetutya. Tiu ĉi klubo estis fondita de mi, kaj mi daŭre lernis per leteroj de Hans Bakker kaj Anita Dagmarsdotter. Mi estas sekretario

fino lastpaĝe

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Interreto trans Balta Maro

Esperantistoj en la landoj ĉe la Balta Maro komencis plibonigi la rilatojn inter si. Sur tia kampo multe valoras la eblecoj komuniki per Internet kaj per e-poŝto. Ekzemple en Svedio en multaj publikaj bibliotekoj vi povas senpage uzi la interreton.

Kie en la Baltaj Ŝtatoj troviĝas interreto? Mi donas ekzemplon kiun mi legis en sveda gazeto. Mi tradukis la mallongan artikolon.

"La komunumo de Skara zorgos pri instruado al instruistoj en Litovio kiel

uzi e-poŝton kaj interreton en la instruado. La projekto ricevis monon de la Sveda Ligo de Komunumoj. Oni prezentos la finraporton en oktobro venontjare.

Skara jam sendis lernolibrojn kaj 35 komputorojn al la lernejoj de la ĝemelurbo Radviliskis en Litovio. Sed la komputoroj, kiujn Skara donacis, ankoraŭ ne estas uzataj en la lernejoj. La kaŭzo estas manko de la komputora scio de la instruistoj en la lernejoj.

Pro tio la ĝemelurba asocio volas

ke almenaŭ unu instruisto en ĉiu lernejo estu edukata dum unu semajno en novembro. Ili siavice instruos al siaj kolegoj kiel uzi komputorojn en la instruado.

La celo estas ke ĉiuj lernantoj povu komuniki per interreto kaj retpoŝto.


Inspiranto de la ideo kaj la projekto estas la eksa instruisto de matematiko kaj komputora scio Bengt-Göran Wählin. Li respondecas pri la projekto kaj li instruos la litovajn instruistojn.

La komunuma estraro en septembro decidis aprobi la projekton kaj peti monon de la Ligo de Komunumoj. La Ligo decidis donaci 34 750 kronojn, kio estas trimil kronoj malpli ol petis la komunumo de Skara."

(El Skaraborgs läns tidning 28/10 1998)

Kerstin Kristoferson

KRUCVORTA ENIGMO



Horizontale

- Li deziras respondon
- Nomo de viro - Instrumentkolektaje
- Miskresko de organo - Mov'
- Respektinda dam' - Kolektive
- Ludkarto - Kelkfoje kuracil'
- Sufikso de participo - Maljunulin'
- Granda lago en Afriko
- Tersurfaco - Bongusta radik'
- Ofta nom' de servisto - Potloko
- Malluma tempo - Nur nooj

Vertikale

- A Tiajn homojn ŝatas la pastro, dum la pastrino eble tiajn juvelojn
- B Ekzistas - Tersurfaco
- C Monato - Maljesa
- Ĉ Harmoniigont'
- D Fizike tre kapabla
- E Diana - Prepozicio kiu indikas akompanion
- F Flanko - Bonhumorajn
- G Natrio - Masklen
- Ĝ Pentraĵojn kun ĉarniroj
- H Monere - Skribon

daŭrigo

Mia Tanzania vivo

de Kangetutya Esperanto-klubo kaj ankaŭ komitatano de nia funkciuala komitato.

Ni kutime kunvenas kelkfoje ĉe la domoj de esperantistoj en Bunda kaj kiam mi havas liberan tempon mi instruas la lingvon al mia lernanto s-ro Daniel Smith kiu ankaŭ lernas per libro de s-ino Anita.

Robert Dismas
 S.L.P. 25
 Bunda/Mara
 Tanzanio

SOLVO DE 98/5-6

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	V	I	D	I	N	D	A	J	O	J
2	I	R	A	N	O	■	R	E	V	O
3	D	I	V	I	D	A	N	T	A	N
4	B	■	I	C	E	L	■	I	R	O
5	E	N	D	E	M	I	O	■	I	S
6	N	O	R	M	O	A	G	O	■	F
7	D	R	■	A	R	J	I	S	M	E
8	O	M	E	N	E	■	V	I	R	■
9	J	O	T	■	N	E	O	N	T	O
10	N	■	A	M	O	R	N	E	O	N

Lennart Persson